

Pledas Díaz-Canel por fortigi la disciplinon en la batalo kontra? la kronviruso



Havano, apr 2 (RHK) La kuba prezidento Miguel Díaz-Canel kaj la ĉefministro Manuel Marrero, revuis detale la situacion de Covid-19 en Kubo, temo pri kiu oni devas insisti, aparte pri la bezono ke la homoj vizitu la kuraciston tuj kiam eksentas ajnan simptomon.

Díaz-Canel ree insistis pri la “respondeco de la gepatroj pri la restado de la infanoj en la domo, ne surstrate ludante”.

La ĉefministro ankaŭ parolis pri diversaj spertoj tra la tuta lando, rilate al personigita atento al vundeblaj homoj; la agantoj en la komunumo laboras por oferi servojn al la loĝantaro meze de malfacila kunteksto, la rolo de la ne ĉefindustria sektoro kaj de la nacia polico, kiu informas per la ĉefparoliloj kaj atentigas maldisciplinojn de tiuj, kiuj ne bone zorgas la socian distancigon.

Díaz-Canel instigis la ministerion de laboro kaj socia sekureco inspekti dum la venontaj tagoj, kunordige kun la provincaj kaj municipaj registaroj por kontroli la plenumon de la indikoj donitaj pri

uzo de telelaboro, kio devas ankora? esti pli uzata; kaj anka? kontroli ke en la laborejoj ne estu personoj vundeblaj fronte al Covid-19.

La prezidento ur?i?is la koncernatojn “faciligi la transdonon de uzeblaj teroj al personoj, kiuj petis por kultivado, kun ordo, sed sen burokrata?oj, li aldonis, ?ar ni bezonas atingi pliajn produktadojn de nutra?oj.

Dum la kunsido oni reviziis la plenumon de la adoptitaj reguloj flanke de la ministerio de transporto, de la konsilantaro de defendo de Havano kiel parto de laborsistemo, kiu el la centra registaro donas konstantan prioritaton al la batalo kontra? Covid-19.

<https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/218567-pledas-diaz-canel-por-fortigi-la-disciplinon-en-la-batalo-kontra-la-kronviruso>



Radio Habana Cuba